

[noto] fonto: "La Japana Budhano", n-ro 169, 1975 (B.E. 2518)

La Prava Instruo

Pasadika-Suto (Digha Nikajo 29)
清淨經

tradukis **Geo Yoxon**, Britio

Kiam la filozofa Nathaputo mortis liaj disĉiploj ne povis interkonsenti inter si pri la esencaj principoj de liaj instruoj, kaj tiel profunda estas la divido inter la malsamaj interpretoj, ke ili apartiĝis en du kontraŭstarantajn partiojn, akre atakantajn unu la alian per insultoj, minacoj kaj eĉ perforto. Ĉando, la novico, iris al Ananda kaj informis lin pri tio. "Verŝajne," li diris, "Nathaputo ne estis plene kompetenta pri sia filozofio, aŭ li almenaŭ ne kapablis klare kaj nepridubeble instrui pri ĝi."

"Ni iru al la Beatulo, kaj diru al li pri tiu afero," diris Ananda.

La Budho loĝis tiam ĉe familio nomita Sagisto, ĉe la Teknika Kolegio de la Sakjoj.

"En tiu ĉi kazo," diris la Budho, kiam ili priskribis al li la konfliktojn inter la disĉiploj de la mortinta Nathaputo, "la disĉiploj ne estas ĉefe kulpaj, sed pli ĝuste la instruanto pro sia senefika gvidado. Kaj la instruo mem, pro ĝia manko de klareco kaj precizeco, ne kondukas al paca konsento inter la anoj. Oni povas diri, ke la disĉiploj spertas malbonŝancon pro tio, ke ili havis malkompetentan instruanton. Tamen, ili mem meritas la malbonŝancon, pro tio, ke ili elektis tian instruanton.

"Tamen, povas esti, eĉ kun klera instruanto kaj bone prezentita doktrino, ke disĉiplo, pro malatento kaj malfirma disciplino, ne sukcesus posedi la doktrinon, kaj tiel perdas la ŝancon de granda profito por si. Eĉ kun klera instruanto, bone prezentita doktrino kaj plene atenta disĉiplo, devos fine okazi, ke la instruanto mortas. Por la disĉiplo, tio eble ŝajnas nevenkebla perdo, sed, se li jam fariĝis kompetenta pri la edukado proponita de sia instruanto, kaj faris el la doktrino gvidilon nepran kaj neerarigan, tiam la morto de la instruanto ne estas katastrofo por li.

"Por ke firme establiĝu religia sistemo, pli aĝaj kaj pli spertaj anoj, kiuj jam atingis komprenon kaj luminiĝon per la propraj penoj devas funkcii kiel superuloj por instrui aliajn. Kaj la aliaj anoj inkluzivu kaj fratojn kaj fratinojn en la religio, de diversaj aĝoj kaj niveloj de progreso, kiuj sin dediĉas al la disciplino kaj doktrino de la religio. Ankaŭ

devas troviĝi laikoj, viroj kaj virinoj, kiuj penas sekvi la gvidadon de la doktrino en siaj ĉiutagaj vivoj.

"Kaj tiel, Ĉundo, staras mia religio. Mi jam fariĝas maljuna, kaj nelonge povos ankoraŭ resti inter miaj disĉiploj, sed troviĝas superaj Sanghanoj, kiuj estas bone edukitaj, kleraj kaj pretaj por disvastigi kaj defendi la doktrinon; troviĝas disĉiploj sanghanoj kaj sanghaninoj, laikoj kaj laikinoj, kiuj vivas laŭ la instruo de la doktrino. Mia religio estas bone establita, sukcesplena kaj prosperanta. Ĝi estas larĝe disvastigita, populara kaj kompleta. Ne necesas, ke iu aldonu al ĝi, aŭ pliampleksigu en ĝi tiun punkton aŭ alian.

"Tial, Ĉundo, vi kaj viaj amikoj, al kiuj mi klarigis la veron, devus kun eniĝi de tempo al tempo por renovigi la memoron pri la doktrinoj, kiujn mi instruis, por kompari unu signifon kun alia, kaj frazon kun frazo, por ke tiu ĉi pura religiotransdoniĝo dum tre tre longa estonteco, por la bonfarto kaj feliĉo de multaj, pro amo al la homaro. Kaj, se iu esprimus malĝustan signifon, aŭ uzus malĝustajn frazojn por esprimi signifon, vi ne forpelu lin de vi, nek riproĉu lin pro tio, sed, kun zorgemo kaj pacienco klarigu al li la ĝustajn signifojn kaj frazojn. Aliflanke, tiun, kiu parolas ĝuste kaj prave, vi laŭdu kaj gratulu.

"Mi instruas novan doktrinon por la subpremo de avido, sed ne pere de asketismo. Viaj vestoj, manĝaĵoj, loĝejoj kaj medikamentoj estu sufiĉaj por la bezonoj de la korpo, por konservi sanon kaj energion. Se la anoj de aliaj religioj diros, ke vi vin dediĉas al plezurema vivo pro tio, la respondo estu, ke ekzistas diversaj formoj de plezuremo: iuj damaĝaj, kaj aliaj nedamaĝaj.

"Ekzistas kvar damaĝaj formoj de plezuremo: per kaŭzo de mortigo; per preno de tio, kio ne estas volonte donita; per mensogaj paroloj; per ĝuo de volupto. Tiajn miaj disĉiploj ne emas.

"Miaj disĉiploj emas la plezuron de meditado, libera de volupto kaj malbonaj ideoj, kun trankvila kaj konvinkita menso. Enplantita en ili estas kodo de konduto, kiun ili tute ne malobeas: ili ne intence prenas la vivon de iu vivanta estaĵo; ili ne ŝtelas; ne kondutas malvirte; ne mensogas; ili ne amasigas riĉon por sin indulgi per egoismaj plezuroj; ne agas malĝuste pro particeco, malamo, stulteco aŭ timo.

"Kelkaj kritikemuloj parolas pri mia scio de la pasinteco kaj mia envido en la estontecon, sed mi nur parolas pri pasinteco, estanteco aŭ estonteco kiam el la pasinteco oni povas profite ĉerpi lecionon, aŭ pri la estanteco se en ĝi troviĝas okazo por fari bonon, aŭ por fortigi kuraĝon per rigardo al la estonteco. Rilate demandojn pri la ekzisto aŭ neekzisto de la Tathagato post lia morto, aŭ ĉu la mondo estas eterna aŭ ne, aŭ ĉu iu ĝin kreis, aŭ ĉu ĝi estas memkreita, mi ne havas komenton por fari, responde al tiuj kritikemuloj. Kaj simile mi respondas pri la egoo, se iuj diras ke la egoo povas fariĝi vide-

bla aŭ konscia post la morto, kaj aliaj diras ke ne. Se ili pretendas, ke tiu aserto, aŭ alia, estas ĝusta, kaj ĉiuj aliaj malĝustaj, mi simple respondas, "Ĉu tion vi opinias, amiko?" Sed mi nek konsentas, nek malkonsentas, ilian vidpunkton. Mi jam klarigis al vi tion, kio estas klarigenda: Sufero ekzistas, ekzistas Kaŭzo de Sufero -- per la elimino de avido --, estas Vojo -- la Nobla Okera Vojo -- kiu kondukas al la Ĉeso de Sufero. Mi instruis al vi la Kvaroblan ekzercon de Pripensemo, pri la korpo, la sentoj, la pensoj kaj la ideoj, tiel ke vi ĉiam konsciis viajn proprajn reagojn, kaj restu fervoraj kaj memregataj. Tiel vi venkos kaj la sopirojn kaj la korpremiĝojn oftajn en la monda vivo."

Upavano staris malantaŭ la ŝultro de la Beatulo, ventumanta lin, dum li parolis. "Mirinda, belega estas via klarigo pri la doktrino, Sinjoro," li diris.